

INFORMA

# bulteno

DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

---

JANUARO - MARTO 1964 Numero 4 /66/

*Al vi. . .*

Egipta amiko rakontis al mi unu el belegaj arabaj fabeloj:

"Egipta faraono donis taskon al fama skulptisto por krei eksterordinaran, ĝis nun neverkitan statuon. "

La skulptisto verkis sfinkson, statuon duon-virinan, duon-leonan. La statuo tiel plaĉis al la aŭtoro, ke li karesis mamojn de la statuo, kaj en tiu ĉi momento la statuo viviĝis kaj diris al sia kreinto: „Denove mi viviĝos kiam iu diros al mi la plej belan vorton, jam konatan en la mondo.“

La skulptisto rakontis tion ĉi al la faraono kaj la faraono tuj kun la tuta kortego iris al la sfinkso. Antaŭ la statuon li metis la plej brilegajn juvelojn kaj diris al la sfinkso: „Ĉi tio estu via, se vi viviĝos!“ Sed okuloj de la sfinkso, trankvilaj kaj misteraj, nekortuŝite rigardis ien en la dezerton. Eĉ tiuj brilegaj juveloj ne povis la sfinkson vivigi.

Post multaj jaroj venis al la sfinkso glora reĝo, konkerinto kaj suvereno de multaj landoj. Li diris al la sfinkso: „Ĉiuj landoj, en kiuj mi estas reganto, estos viaj, se vi viviĝos!“ Eĉ ne tiam viviĝis la sfinkso, kaj ĝiaj okuloj, trankvilaj kaj misteraj, nekortuŝite rigardis ien en la dezerton.

Nek juveloj, nek gloro kaj potenco povis vivigi la sfinkson. Pasis multaj kaj multaj jaroj.

Grupo da arabaj nomadoj survoje tra la granda dezerto ripozis ĉirkaŭ la sfinkso. Neatendite alrapidegis mortportanta ventego - simuno. La nomadoj rapide kun ĉiu sia havaĵo kaj kun kameloj kure savis sin, sed ili forgesis sub la sfinkso knabineton, kiu nur en la lasta momento ekkonis, ke tiu alrapideganta ventego estas io mortportanta.

En timego ŝi rampis supren sur la statuon de la sfinkso kaj en tiu terura timego ekkriis la forlasita knabineto: „PATRINO!“ Kaj en ĉi momento, kiam la knabineto ekkriis „patrino!“, la sfinkso viviĝis.

Leonaj piedegoj ĉirkaŭprenis la knabineton kaj premis ŝin inter la mamojn. La sfinkso viviĝis kaj savis la knabineton, ĉar ĝi estis alparolita per la plej bela vorto, jam konata en la mondo: „PATRINO!“

Karaj samideaninoj, la 8-an de marto festas la tuta mondo la Internacian tagon de virinoj.

Al vi ĉiuj virinoj kaj patrinoj, ni ne nur gratulas, sed ni dankas al vi por via oferemo kaj amo.

KLM

Okaze de la Internacia tago de virinoj okazis en nia klubejo malgranda festo. Niaj samideaninoj ricevis bukedeton da konvaloj. Programon preparis Distrikta kultura domo kaj post la programo sekvis dancado.

RAPORTO PRI LA ĜENERALA KUNVENO DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA  
kiu okazis la 14-an de februaro 1964

Malgraŭ granda frostoj kunvenis geklubanoj en nia nova klubejo en Praha 1, Řeznická strato 17, kaj je la 20. 15 horo malfermis la ĝeneralan kunvenon vicprezidanto s-ano Slanina. Pri kluba laboro dum la pasinta jaro kaj pri la laborplano 1964 raportis la prezidanto, la kasistino kaj la kultura referanto. Iliaj raportoj estis akceptitaj kaj aprobitaj.

Diskuto, klu sekvis post la oficiala parto de la kunveno, alportis interesajn sugestojn, ne mankis eĉ kritiko. La ĝenerala kunveno finiĝis duonon post la 23-a horo.

EL LA RAPORTO DE KLUBA PREZIDANTO:

Samideano Rudolf raportis pri multaj organizaj problemoj, kiujn devis nia klubo solvi kaj li konstatis, ke preskaŭ ĉiuj taskoj kaj problemoj estis dum la pasinta jaro bone solvitaj.

"Ni kunvenadas nun en nova, bela klubejo", diris la prezidanto, "preskaŭ ĉiuj eksterlandaj gastoj, kiuj nin en la pasinta jaro vizitis, enviis ĝin al ni. Ek de la nuna jaro atendas nia respubliko dekmilojn da eksterlandaj gastoj, certe, ke eĉ ni povas ankaŭ multajn atendi. Por ni tio signifas: regule kunvenadi, bone lerni la lingvon kaj ĉiam esti pretaj ĉiuflanke helpi al eksterlandaj samideanoj. En nia =I. B. = aperos varba propagandilo, kiun ni dissendos al ĉiuj adresoj, kiuj estas je nia dispono. La atingot-aj rezultoj estos gravaj dokumentoj kontraŭ tiuj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ dubas pri Esperanto. Do nin atendas novaj formoj de laboro. Ĝis nun ni nur kunvenadis, lernis kaj plejparte nur pasive partoprenadis niajn programojn. Estis nur unuopuloj, kiuj aktive laboris. Nun havos vi ĉiuj eblecon eklabori!"

Pri la klubaj problemoj diris la prezidanto, ke la kultura referanto, kvankam li ne havis sufiĉe da spertoj, preparis bonajn programojn kaj el tiuj li memorigis prelegojn de samideanoj Vitek, d-ro Černý, d-ro Hradil, amikajn vesperojn okaze de la Internacia tago de virinoj kaj okaze de la vizito de granda karavano de eksterlandanoj el Anglujo, Belgujo, Francujo kaj Nederlando, kaj la rakontadon de Merita membro de Nacia teatro, portanto de Ordeno de la laboro, majstro Rudolf Deyl, sen.

"Niaj lingvaj kursoj", konstatis la prezidanto, "estas en bonaj manoj. Samideano Slanina instruas en kursoj por komencantoj kaj por progresintoj, konversacian kurson gvidas s-ano inĝ. Felix. Ĝojigan sciigon vi aŭdis de s-ano Nevan, kiu fondis malgrandan, sed viglan junularan E-rondeton ĉe Ĉeĥoslovaka Junulara Asocio. Tial ni povas diri", daurigis s-ano Rudolf, "ke nia bilanco estas favora, kvankam ni en ĉiuj punktoj de nia laborplano ne povas esti kontentaj. Kvankam la diametra ĉeesto de geklubanoj en la kunvenoj kreskis en komparo kun la jaro 1962 el 27 je 47, tamen tiuj 47 ne estas eĉ la kvarono de ĉiuj geklubanoj. Tial mi adrese demandas: =Kial vi ceteraj ne vizitadas almenaŭ de tempo al tempo niajn kunvenojn?"

Fine de sia referato dankis la prezidanto al ĉiuj, kiuj ofereme laboris por la klubo, por Esperanto-movado kaj li esprimis esperon, ke la jaro 1964 estos ankoraŭ pli sukcesa ol la jaro pasinta. Red.

---

La 10-an de februaro vizitis nian klubon la 1-a sekretario de la Reĝa dana ambasadorejo en Praha sinjoro Eskil Svane, kiu estas eminenta esperantisto. La ŝatata gasto rakontis al ni pri kulturaj kaj historiaj belaĵoj de sia patrujo kaj sian prelegon li akompanis per filmoj. Red.

La 31-an de januaro aŭdis niaj geklubanoj interesan dueton de geedzoj Bartošík. S-ano Ynke kaj s-ano Dolfa rakontis pri sia esperantista laboro. Red.

# UNU JUBILEO

Irante sur dekstra bordo /kajo/ de Vltava inter pontoj de Jirásek kaj de La 1-a de Majo, de Slava-insulo. ni admiras panoramon de Hradčany /la kastelo de iamaj ĉĥaj reĝoj kun la katedralo de Sta Vito/ kaj je nia dekstra mano ni havas okazon admiri =Oran Kapeleton= - Nacian teatron.

Ĉirkaŭ ni estas ĉie tumulto kaj homsvarmado de metropolo kaj oni ne volus kredi, ke ankoraŭ en la jaro 1852 staris ĉi tie malnova saltenejo kaj nur de temp' al tempo oni vidis promveturantan kaleŝon sur la bordo aŭ kelkajn piedirantojn, kiuj ekhaltis por Observi mevojn. Tiu ĉi jaro 1852-a estis la lasta por la saltenejo. La tenejon acetis Korporacio por konstruo de Nacia teatro, de Eleonoro de Šloseroj por 45 000 florenoj.

Pasis 29 jaroj, kiam jam preskaŭ finkonstruitan verkon detruis granda incendio.

Novaj du jaroj pasis: La 18-an de novembro 1883 celadis al feste dekoraciitan Praha el ĉiuj regionoj de Bohemio kaj Moravio delegacioj kaj unuopuloj por ĉeesti solenan malfermon de la Nacia teatro. Plenplena spektejo aŭdis la unuan fojon la senmortajn tonojn de la opero =Libuše=. Ĝia aŭtoro, Bedřich Smetana, devis tiam letere peti la direkcion de la teatro pri enirbileto por si mem. En la jaro 1963 festis nia nacio 80-jaran jubileon de ekzisto de la Nacia teatro en Praha.



Okazis festaj prezentadoj, prelegoj, ekspozicioj. En la gazetoj oni skribis pri historio de la Nacia teatro, kaj same ĝin festis rádio kaj televido.

Esperantista klubo en Praha invitis en sian rondon Meritan membron de N. T. , portanton de Ordeno de la laboro, majstron Rudolf Deyl, sen. Li al la ĉeestintoj rakontis pri sia vivo de aktoro. Sian rakontadon ĉerpis majstro Deyl el puto de riĉaj personaj rememoroj kaj travivaĵoj. Majstro Deyl, kiu ĉi jare festos sian 88-jaran vivjubileon, rolis unue ĉe variaj imigrantaj teatrogrupoj, poste li fariĝis membro de la teatro en Plzeň. De Plzeň li venis rekte al Praha, kaj li mem diras: "15 jarojn mi ĉiuvespere rolis kun jam morta, sed tamen nemortema Eduard Vojan, 6 jarojn kun Jindřich Mošna, 2 jarojn kun Hana Kvapilová kaj 33 jarojn kun Marie Hübnerová. "

Parolante pri tiuj artistoj, majstro Deyl nomas ilin =malnova gvardio= kaj li substrekas, ke el ili vivas nur Nacia artistino Leopolda Dostálová kaj li.

Ni petis majstron Deyl, ke li rakontu al ni 20 au 30 minutojn. Sed li parolis plenajn du horojn kaj neniu el ni eĉ ne moviĝis. Nia =I. B. = eĉ ne kapablas mallonge represi paroladon de majstro Deyl, tiom riĉa ĝi estis. Kaj ni ĉiuj kun li sentis, kiam li fine de sia parolado diris: "Verŝajne lasas min Dio tiel longe vivi, ke mi rakontu al la nuna generacio pri mia vivo, ke ĝi ne ĉiam estis facila, mi devis multe kaj multe labori, studi, ne nur rolojn, sed eĉ lingvojn, ekzemple krom aliaj lingvoj mi mem devis lerni slovenan lingvon, ĉar mi rolis kelkajn jarojn en Ljubljana. " Kompreneble, kiam majstro Deyl finis sian paroladon, sekvis longdaŭra aplaudo. Kaj kiam ni al li dankis, demandis lin nia prezidanto:

"Kaj kara majstro, ĉu ni povas esperi, ke vi denove vizitos nin kaj rakontos al ni pri viaj travivaĵoj?"

Majstro Deyl respondis: "Nu, kompreneble, mi certe venos!"

Esperantista klubo en Praha kaj la redakcio de =I. B. = dankas al majstro Deyl, sen. Merita membro de N. T. kaj portanto de Ordeno de la laboro, por belega vespero, kiun ni travivis kun li kaj ni deziras al li:

"Vivu multajn jarojn en plena sano kaj transdonu viajn spertojn kaj arton al nova generacio!"

S. H.



Ĉu vi havas hejme leonon? Vi ĝin ne havas? Vi diras, ke ne estas eble havi hejme tiel grandan kaj danĝeran beston? Ni povua montri al vi dokumentfoton de leono en iu infana ĉambro en Praha, sed bedaŭrinde la leono Argos estas primadono, kiu ne volonte lasas sin fotografi kaj krom tio ĝi estas nuntempe ie survoje kun la cirkuso kaj nia kompatinda fotoreportero senefike klopodis akiri ĝian foton.

„ĈU VI HAVAS HEJME LEONON?“ estas titolo de nova ĉĥa filmo de reĝisoro Pavel Hobl. La filmo eatas tiel nomata infana muzikalfilmo /=muziklo=/. Ĝi enhavas multan muzikon kaj kantetojn. Estas tie parolantaj kaj kantantaj hundoj, ursoj, eta aŭtomobilo

kaj unu el la ĉefpersonoj estas reĝo de bestoj - la Leono. La filmo montras poezion de la plej ordinaraj objektoj, kiuj estas en nia ĉirkaŭaĵo kaj kiuj vivaa sian propran vivo, kiu estas plena da sorĉoj kaj aventuroj, ĝi enhavas elementojn de lud-trik- kaj marionetfilmoj. Mi petis reĝisoron Pavel Hobl, ke li respondu al mi kelkajn demandojn por nia mikrofono.

Dem. : "Kiu ĉefrolas en tiu ĉi filmo?"

Resp. : "Rolas neaktoroj, infanoj. La rolon de pentristo ludas akademia pentristo Jan Brychta kaj la rolon de kamenskrapisto unu vera praga profesiulo. La rolojn de muzikistoj ludas membroj de la orkestro de Karel Krautgartner kaj solisto d-ro Marian Cingroš. La ĉefrolojn ne ludas homoj, sed bestoj. Prezento de unu el ĉefaj roloj estas leono Argos, alia granda rolo estas en piedetoj de irassetro-hundo kaj de 9 ĝiaj gekolegoj, kiuj en la filmo ankaŭ kantas. "

"Kaj kiel vi, sinjoro reĝisoro, estis kontenta kun tiuj bestaj aktoroj?"

Miajn reĝisorajn intencoj tre bone kaj senteme komprenis, kvankam ili ne legis la scenolibron. "

Dem. : "Kaj ĉu vi ne timis la leonon?"

Resp. : „Ni ne timis - ĝi estis en la kaĝo - ne vere, ni estis en la kaĝo kaj sinjoro Leono promenadis en la infana ĉambro. "

Dem. : „Do vi kaj viaj kunlaborantoj estis kuraĝaj. Mi respektus la leonon eĉ se ĝi estus en la kaĝo. Mi ŝatas rigardi tiajn =bestojn= nur sur la bildo. Ĉu vi ne volus diri ion pri vi mem, pri via estinta filmlaboro, pri viaj estontaj planoj?"

Resp. : "Mi devas konfesi, ke tiu ĉi filmo estas mia unua tutvespera. Tamen mi ne estas komencanto en la filmlaboro. Mi turnis ĝis nun plejparte dokumentfilmojn. "

Dem. : "Kiun el viaj filmoj vi plej ŝatis?"

Resp. : "Du! La unuan =La fantazio por la maldekstra mano kaj homkoncienco=, tial, ke ĝi estas muzikfilmo kaj tio estas genro al mi plejproksima. Tiu ĉi filmo estis premiita okaze de la filmfestivalo en Venecio. Mia dua plej ŝatata filmo estas =Atendo je Darong Bawan=. Ĝi estas lirika ra-portaĵo, kiun mi turnis en Borneo en la jaro 1961. "

Dem. : "Ĉu vi jam restos fidela al tutvesperaj filmoj?"

Resp. : "Al tutvesperaj jes, sed ne al ludataj. Mi preparas nun filmon laŭ rakontoj de amerika verkisto O' Henry, ĝi estos marionetfilmo. Krom tio mi preparas samtempe mondpremieron de la opero =Antigono= de Iŝa Krejĉi laŭ teatraĵo de Sofokles. Tiu ĉi filmo estos por televido, la puliko vidos ĝian unuan prezentadon en junio 1964 okaze de la Televidfilma festivalo en Hamburko. "

Mi dankas al reĝisoro Hobl por liaj informoj kaj por lia estonta laboro, kaj mi deziras al li "rompu la nukon!" +/

S. H.

+/ rompu la nukon= - estas deziro de la aktoroj /deziri sukceson estas nedezirate/.

## **LIBERTEMPU EN ĈEĤOSLOVAKIO!**

E k k o n u e n Ĉeĥoslovakio - ĝian prahistorion, historion kaj nuntempon  
A d m i r u e n Ĉeĥoslovakio - naturbelecojn, vidindaĵojn, folkloron  
K o n a t i ĝ u e n Ĉeĥoslovakio kun kulturaj trezoroj, kun ĉiuflanka progresado de industrio, de sciencoj, de terkulturado ktp.

V i z i t u e n Ĉeĥoslovakio - monatonatajn banlokojn, ekspoziciojn, muzikfestojn

N e f o r g e s u e n Ĉeĥoslovakio viziti Esperantistajn klubojn

ĈEĤOSLOVAKIO INVITAS VIN!

Eksterlandaj interesuloj! Por informoj skribu nur en Esperanto al: =INFORMA BULTENO=, P. B. 1108, Praha I. Ĉeĥoslovakio al: Ĉ E D O K - Praha, Ĉeĥoslovakio  
ALDONU RESPONDKUPONON!

## **BILDO EL ĈEĤOSLOVAKIO - Suda Bohemio**

"Mi fariĝis ĝia kaptito" - respondis al ni akademia pentristo František Líbal, kiam ni demandis lin, kial li ĉerpis plimulton de sia dumviva verko el motivoj de Suda Bohemio. "Komprenu, Sudan Bohemujon ne sufiĉas nur pentri, per koloroj oni devas ĝin adori. "

La pentristo sentas sin dorlotata inter ĝiaj laĝetoj, karesata per moleco de herbejoj kaj per teneraj radioj de guno, dorme ensorcata per kvieto de ĝiaj arbaroj kaj de bonodoro de aŭtunaj erikejoj.

"Rigardu nur!" - kaj majstro, kiun ni vizitis en lia ateliero en Praha montras al ni kelkajn el siaj bildoj. Tri ĉefajn temojn ni vidas: sudbohemaj akvoj-fiŝlaĝoj kaj pejzaĵoj de Zlatá stoka /Ora rivereto/ faras la ĉefan ciklon. La du ceteraj temoj estas bildoj de sudbohemaj arbaroj kaj torfejoj. La majstro estas la unua, kiu ilin bildigis - 3500 da liaj bildoj ornamas diversajn galeriojn. Liajn bildojn ni renkontas en ĉeĥoslovakaj ambasadejoj en la tuta mondo eĉ en privataj kolektoj. En tiuj ĉi lokoj rakontas lia verko pri beleco de sudbohema regiono. Kaj tiu ĉi regiono plene meritas tiun ĉi laŭdon.

La tuta regiono, kiu komencas ĉe profundaj arbaroj de Ŝumava, estas plena de naturbelecoj. Kaj en tiu ĉi natura kadro la generacioj de loĝantoj konstruis kolorajn vilaĝojn, fierajn urbojn, kastelojn, klostrojn kaj firmajn burgojn, kiuj gardis la regionon. Sur ĉiu paŝo oni renkontas gloran kaj tragikan historion kaj esperigan nuntempon.

Vi iras tra la regiono, kie apud manovaj romantikaj forĝejoj elkreskis modernaj fabrikoj, kie al fiŝlaĝoj de urbo Třeboň - konstruitaj de Jakub Krčín el Jelčany aliĝis multaj akvobaroj. Vi iras tra la regiono, kie marŝis venkantaj husanaj batalantoj; vi iras tra la regiono de Kvinpetala rozo de sinjoroj de Rožmberk; vi iras tra la regiono de kantoj kaj dancoj - vi iras tra la regiono, kien vi ĉiam kun ĝojo revenos. Vi iras tra la Suda Bohemujo.

AL LA BILDO DE ĈEĤOSLOVAKIO František L í b a l naskiĝis la 7-an de aŭgusto 1896, li studis gimnazion en Tábor kaj Jindřichův Hradec, kaj abiturientiĝis en jaro 1916 en Třeboň. Li estis lernanto de akademio en Prah. En jaro 1921 li iras en Germanujon kaj daŭrigas studadon en Munchen, Nürnberg, Dresden, Berlin kaj Frankfurt am Main. En jaroj 1925-1926 li estas en Paris, Reims, Ruen kaj Marseille. En jaro 1926 li revenas al Praha. Li ofte vizitas montarojn Altaj kaj Malaltaj Tatroj, folkloran regionon Valaŝsko kaj montojn Krkonoše. Li vizitas ankaŭ Alpoj en Aŭstrio, Jugoslavion, Svislandon kaj Italujon. Sed la plej ŝatata de li estas Suda Bohemujo. Vizitinte ĉeĥoslovakion ne forgesu viziti urbon Třeboň, kie majstro Líbal loĝas, kaj vi ekvidos lin en diligenta krea laboro.

# PRINTEMPO DE PRAHA

Post la dua mondmilito la publiko de la tuta mondo ekamis festivalojn, kiuj per muziko kunigas ĉiujn naciojn. =PRINTEMPO DE PRAHA= en la vico de tiaj festivaloj havas elstaran lokon per sia tradicio, elekto kaj alta nivelo de koncertoj.

Antikva historia Praha kun florantaj parkoj kaj palacĝardenoj, faras certe belan kadron por muzikfestivalo. Por internaciaj artistoj estas granda honoro ludi en iu el tiuj ĉi koncertlokoj. Ni diras intence koncertlokojn - ĉar la muziko ne sonas nur el kutimaj koncertejoj, sed ĝi estas lokigita en ĝardenojn kaj en antikvajn historiajn lokojn de Praha.

Tial dum la festivalo =Printempo de Praha= la koncertoj okazados en Mauzoleo de literaturo en Strahov, en preĝejo de Týn, en la katedralo de Sta Vito. Oni koncertos, ekzemple eĉ en baroka palaco de Valdštejn.

Praha nunjare estos en la signo de =La jaro de ĉeĥa muziko= t. e. oni propagandos altan nivelon de ĉeĥa muzika sentemo. Oni prezentos verkon de kvarcentjara jubilanto Kryštof Harant el Polžic, la elstara personeco renesanca. Kryštof Harant estis aktiva kiel verkisto, vojaĝanto kaj lia muzika heredaĵo havas altan nivelon.

Al Praha venos unuopaj famaj solistoj, inter kiuj estos David Oistrach kaj E. Gilels. El muzikestroj alvenos E. Kurtz el Usono, W. Sgwallisch el Okcidenta Germanujo, W. Susskind el Kanado kaj aliaj.

Prepara komitato intensive laboras pri festivala programo, kiu kunigos ne nur ejstarajn artistojn sed kiu emfazos eĉ ton, kio por ĉeĥa kulturo kaj ĉefe por ĉeĥa muziko estas karakteriza - ĝia riĉeco kaj spontaneco. Venontjare estos =Printempo de Praha= jam dudekjara, kaj ĝiaj programoj atestos belecon de muzikanto.

Jitka Snížková

## PETR BEZRUČ KAJ ESPERANTO

Depost la morto de la nacia artisto Petr Bezruč (+17. 2. 1958/), la aŭtoro de la fama poemaro =Sileziaj poemoj=, okazas ĉiujare en septembro la tiel nomata OPAVA/ je la nomo de Bezruč.


Lastjare oni aranĝis jam la kvinan fojon tiun ĉi rememorigan solenaĵon. La feston partoprenis la plej elstaraj nuntempaj poetoj, verkistoj kaj literaturhistoriistoj el Ĉeĥoslovakio. Interalie oni sciigis tie, ke la granda revolucia poema verko de Bezruč estas konata en multaj landoj de la mondo. Tute aŭ parte ĝi estas tradukita en dudek ok lingvojn.

En la septembra simpozio oni substrekis la fakton, kiu ege ĝojigas nin. La funkciulo de la simpozio Jiří Urbanec diris laŭvorte: "Antaŭ ĉio oni ne povas sufiĉe pritaksi la meriton de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj, kiuj per sia antologio =Sileziaj poemoj=, eld. en la jaro 1927 en Michálkovice apud Ostrava ebligis al la poeto eniron ankaŭ tien, kie oni ne konis ĉeĥan lingvon. Pere de Esperanto oni faris de la tradukojn ĉinajn, japanajn, vjetnamajn kaj aliajn." Jen tre grava eldiro antaŭ la forumo de intelektuloj, kiuj ne ĉiam kun simpatio esprimas sin pri la meritoj kaj realaj eblecoj de la Internacia lingvo sur la kampo de literaturo. Por ni esperantistoj, kiuj estas konvinkitaj pri la signifo kaj praktika uzebleco de Esperanto en la vivo, ni citas la supran eldiron sen plia komentario.

FABA

+/ OPAVA estas urbo, sitpanta en Silezio, kie Bezruč loĝis.





### DIPLOMO

La komitato de la esperantista klubo en Praha ĉe OKD1, Praha 1, nomis en sia ĝenreala kunveno la 14-an de februaro 1964

S-ANON Jaroslav Šustr HONORA PREZIDANTO  
DE LA ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA PRO GRANDAJ MERITOJ KAJ  
LONGJARA SENLACA LABORO POR LA KLUBO, KIU DANK' AL LA MULTFLANKA,  
ĈIAM ENTUZIASMA AKTIVECO, AKIRIS INTERNACIAN REPUTACION.

La 24—an de januaro parolis s-ano J. Šustr okaze de la 80jara vivjubileo de s-anino Julie ŠUPÍCHOVÁ pri riĉa tutviva verko de la jublantino. La klubo kaj la redakcio elkore gratulas al s-anino Julie Šupichová.

La 14—an de septembro 1963 mortis nia membro samideano RND-ro Karel Krejčík, kaj la 8-an de februaro 1964 mortis samideano inĝeniero Antonin Pingerland. En ambaŭ perdis nia klubo entuziasmajn kunlaborantojn.

Nia klubo kaj la redakcio de "I. B" profunde kondolencas al la familioj de s-ano Krejčík kaj de s-ano Pingerland.

En Písek, la 17-an de septembro 1963, subite forpasis s-anino Alžběta Frolíková, en sia 74-a vivaĝo. Depost jaro 1928 ŝi estis agema membrino de S-klubo en Písek.

80 JAROJN DE D-ro STANISLAV KAMARÝT Se li ne estus mortinta en la jaro 1956, li estus nun jam 80-jara. Gemembroj de Esperantista Klubo en Praha kun sia prezidanto vizitis dimanĉe la 3-an de novembro, pasintjare, la tombon de d-ro Kamarýt en Praha, ornamis ĝin per floroj, florkrono kaj esperanta flageto, Pri la vivo kaj meritplena laboro de d-ro Kamarýt parolis s-ano Šustr. ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO, pri kies eldono Kamarýt plene meritis, alportita al la tombo, rememorigis al la ĉeestantoj, ke Kamarýt estis unu el la du redaktoroj de tiu plej bela libro.

## GEEDZIĜOJ:

Nia kultura referanto s-ano Jindra Ondráček fariĝis ekzemplo por nia s-ano JUDr-o Miloš N ý v 1 t.

S-ano Ondráček edziĝis la 29-an de decembro 1963 kaj s-ano Nývlt faris la samon la 1-an de februaro 1964. Ĉar neniu el ili, antaŭ la edziĝo petis nian konsilon, la klubo kaj la redakcio ne respondas pri tiuj faktoj kaj povas nur gratuli.

Rimarko de la redakcio: Ĉu ni povos ĝis la jarfino gratuli al novaj denaskaj esperantistoj?

## TRIBUNO DE NIAJ LEGANTOJ

Dum la pasinta jaro ricevis nia redakcio dekojn da leteroj el (Ĉeĥoslovakio kaj el eksterlando. Krom gratulleteroj ni ricevis leterojn, en kiuj la skribintoj nin petas pri publikigo de iliaj anoncoj kaj ke ni zorgu pri ilia vizito en Ĉeĥoslovakio ktp. Laŭ niaj eblecoj ni plenumis ĉiujn tiujn petojn. De tempo al tempo ni ricevis el eksterlando eĉ kontribuojn por nia =I. B. =. / Preskaŭ pli ol de niaj geklubanoj, rim. de la red. !/ El ili ni elektis por tiu ĉi numero de =I. B.= kontribuaĵon de s-ano J. R. , kiu vivas en Okcidenta Germanio.

La 30-an de januaro 1943 kapitulaciis en la ruinoj de la tiama urbo Stalingrad la 6-a Nazi-armeo. Ni ne povas dubi pri tio, ke la aŭtoro de nia artikolo estas unu el tiuj partoprenintoj, kiuj travivis tiun ĉi batalegon sur la bordo de Volgo. En sia letero skribas al ni s-ano J. R. , ke la senco de nia kontribuo estas =batali kontraŭ la milito kaj konservi la pacon en la mondo=. La redakcio intence ne korektis la artikolon. Tiu ĉi represo de la originalo estas pli valora kaj certe ĉiu leganto komprenos. /La vorton =statbataloj= komprenu=urbaj aŭ enurbaj bataloj=, rim. d. l. red. /

Antaŭ dudekunu jaroj. . . Stalingrado /Volgogrado/.

. . . La artileripafado estis senkompata, la malvarmeco 30°-40°, preskaŭ neeltenebla. Tamen la germanaj soldatoj atakis laŭ ordono. Ili stumbis en pikildratoj kaj detruitaj traboj, ili vidis frostpereinajn kameradojn ĉe kontraŭulojn. Ili atakis sin en kruela batalo unuj kontraŭ aliaj; germanoj kaj rusoj. Estis frenezeco. Miloj mortis en unu tago. Dekmiloj en unu semajno. . . Dum monatoj. . . Kiam generalo von Paulus je la 2-a de februaro 1943 subskribis la kapitulacian dokumenton, la tuta urbo Stalingrad estis detruita.

Post la kapitulacio oni enterigis 147 000 germanajn kaj pli ol 50 000 rusajn soldatojn batal- kaj frostmortigitajn. La ceteraj viktimoj de la diktita frenezeco mortis en la ĥaoso. Pli ol 90000 germanaj soldatoj/la resto de la iama armeo de 340 000 homoj/ lacaj de statbataloj , disenterie-malsanoj, subnutritaj, kun frostigitaj piedoj kaj, maldikaj vestaĵoj, en nutraĵoj marŝis en la kapitulecon. La datreveno de tiu ĉi okazaĵo devas admoni nin ne plu halti duonvoje, batali varbcele, buse, skribe kaj age por la paco. Tio estas la plej necesa por la tuta homaro, por la tuta mondo. Ni ne devas lacigi, en nia penado labori por efektiviĝi ĉi tiun altan celon. Ĉiu laboru por la paco! Vivu la Paco!

Nia redakcio ricevis, leteron de s-ano Teo JUNG, estinta ĉefredaktoro de =Heroldo de Esperanto=. En la letero informas nin s-ano Jung pri interesaĵo rilata al artikolo pri s-ano Omelka en la tria numero de =I. B. =. El lia letero ni citas laŭvorte:

". . . Koncerne s-ron Omelka, mi informas vin, ke troviĝas en miaj manoj lia manuskripto =La Granda Admiralo=, romano pri la historia ĉirkautera vojaĝo de Fernando Magelano, interesa kaj, post revizio, eldoninda. Estis mia intenco eldoni ĝin, sed provizore mi tion ne povas fari. . . "

Ni dankas al s-ano Teo Jung, por lia vere interesa kaj grava informo.

Red.



## ESPERANTO SERVO!

Norvega minejinstituto, abonas inter aliaj fakgazetoj ankaŭ ĉeĥan gazeton, en kiu estis artikolo =Vodní ucpávka=, kiu temas pri senpolvigo de minejaj koridoroj. Ĉar neniu povis la ĉeĥan artikolon traduki, la Norvega instituto petis Norvegan Esperanto- Ligon ĉu ili povus per Esperanto ricevi tradukon. Prezidanto de N. E. L. s-ro Stop-Bowitz letero petis min pri traduko de tiu artikolo, kiu eble helpas apliki ĝian praktikan uzon en norvegaj minejoj.

Feliĉe mi trovis konatan fakulon inĝ. Vlastimil Kočvara en Opava. Li tradukis postulitan artikolon kvankam la fakaj terminoj faras malfacilaĵojn kaj sendis ĝin al s-ro Sop-Bowitz en Oslo. Ni esperas, ke tiu Esperanto-servo alportos sendanĝerecon al norveg- aj minejaj laboristoj.

J. Hebký

## KORESPONDANTO

### BULGARIO:

= Grupo de 12-15-jaraj gelernantoj deziras korespondi kun samaĝaj knaboj kaj knabinoj. Adreso: PIONERSKI DOM, Vraca, Bulgario.

s OGNJANA GEORGIEVA, un. Svilengrad, str. Georgi Dimitrov 16, Bulgario, 17- jara, deziras korespondi.

= VESKA VERSAMOVA, ur. Haškova, str. Kapitan-Andreevo, Bulgario, 18-jara, dez. korespondi.

= ZDRAVKO KUNOV, ur. Ruse, str. Osvoboditel 28, Bulgario, deziras korespondi.

= MINKA GEORGIEVA, Gabrovo - kv. Bolta 175, Bulgario, deziras korespondi.

= MINKOV PETKOV, Stara Planina 26, Trojan, Bulgario, dez. korespondi.

= TINKO TEMELKOV MOLESKOV, Peter Beron 29, Tolbukin, Bulgario, dez. korespondi.

= KOSTADIN CVETONOV PETROV, str. Zoja Kosmodemjanska 61, Sofio, Bulgario, deziras korespondi.

= CONJO BORISOV MONEV, str. "Baksten" 15, Sevlievo, Bulgario, dez. kor. kun filmamatoroj el Ĉeĥoslovakio.

= KOSTADIN STEFANOV, ul. Perustioa 23 Ruse 5, Bulgario, dez. kor. kun junaj esperantistoj en Praha. .

La redakcio de faka ĉeĥoslovaka revuo =GEOLOGIA ESPLORADO= serĉas eksterlandajn korespondantojn, kiuj sendadus al la redakcio informojn pri esploroj kaj pri novaĵoj sur geologia kampo. La sendotaj informoj povas esti en nacia lingvo. Aldonu ec fotografiaĵojn. sendadu similajn revuojn. Esperantistoj-geologoj, arkeologoj, paleontologoj kaj esploristoj havas okazon montri, ke Esperanto ne estas amokupo, sed ke ĝi estas grava helpilo por scienco.

Adreso:

Redakcio de =GEOLOGICKY PRUZZKUM= /GEOLOGIA ESPLORADO/, Malostranské nám. 19, Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

Represo dezirata!

### HUNGARIO:

= ZSOLTI PETENDI. Lankás str. 5, Miskolc III, Hungario, studento, dez. kor. pri urboj, domoj, muzeoj, monumentoj ktp.

= STEFANO MORVAI, Selyemrét J2, Miskolc Hungario, dez. kor. pri maroj. ŝipoj ktp. = LADISLAO BORDAS, Kossuth-Lajos str. 29, Szolnok, Hungario; JOZEFO TOLDI, Kossuth-Lajos str. 20/1, Szolnok, Hungarujo; KLÁRA CSDKÁS, Csarnok str. 23, Szolnok, Hungario; KATEŘINA SZUDA NAGY Pálfi János-str. . Szolnok, Hungario; MARIA POLÓNYI SZUCS, Madách str. 4, Szolnok, Hungario; EVA UJVARI, Katona str. 5, Szolnok, Hungario; KIÁRA BERÉNYI Beloianisz-str. 32, Szolnok, Hungario; LUDOVIKO SZUCS, Regi vásártér, Szolnok, Hungario; LADISLAO NAGY, Rét-str. 4, Szolnok, Hungario;

BARBARA TASI. Ugar 7 Szolnok, Hungario; LADISLAO PAP, Nád- str. 2, Szolnok, Hungario; GIZELA FICSQR Dózsa Gyorgy str. 1, Szolnok, Hungario; ARANKA GAÁL, Jósika str, 4, Szolnok, Hungario; DEZIDERO SZILAGYI, Mártírok str. 21, Szolnok, Hungario; ĝiuj deziras korespondi kaj interŝanĝi kolorajn poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

POLLANDO:

PIOTR NISHI, ul. Kilińskiego 20/22 Ozarów k/Warszawy, Pollando, dez. koř. kun knaboj kaj knabinoj pri geogra- fio, náture kaj intersangi PM. s DYBA STEFAN, pouz. Libiař Malý, pow. Churzanow, Zarki 519, Kraków, Pollando - deziras korespondi.

RUMANUJO:

= A. REINER. Poet Neculuía 33. Bucuresti Rumanujo, komencanto, kglektas PM kaj deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

= NICU BACRIA, str. Oltului 49, Haionul V. I. Lenin, reg. Bucuresti. Rumanujo, 22- jara, deziras korespondi kun esp. el Ĉeĥoslovakio.

SOVETUNIO:

= "KLUBO DE AMIKECAJ GEKNABOJ", Vilni- us 5, Ukmerges-1xLitovujo, USSR, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

---

"INFORMA BULTENO" de Esperantista klubo en Praha - fakrondeto ce Obvodní kulturní dům ONV 1, Praha 1. Respondeca: Miloř Rudolf. Teknika redakcio: V. Prařák. Lingva redakcio: A. Slanina. Aperas laŭbezone Adreso:"ESPERANTO", P. B. 1108, Praha 1, Ĉeĥoslovakio. Ĉiuvendrede de la 20-a ĝis la 22-a horo telefonu: 22 65 14.